

Verigiften: Nr 1.

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

## DUDEK JAROJ

Nia asocia gazeto „*Bulgara esperantisto*“ festas jubileon: ĝi komencis sian 20-jaran ekzistadon.

Dudek jaroj da ekzistado — tio signifas: dudek jarojn da batalo por la kulturo, dudek jarojn da sindona laboro de sen-nomaj, idealistaj homoj, kiuj oferis siajn fortojn kaj tempon, monrimedojn kaj fervoron por la granda hom-ama afero de Zamenhof.

Dudek jarojn „*Bulgara esperantisto*“ — nia fidela lumturo — per hela strio markis la vojon de la brava bulgara esperantistaro.

Jen ĝi forte kaj hele lumis, jen apenaŭ flagretis, preskaŭ minacate de estingiĝo, ĝia sankta fajro tamen estis ĉiam subtenata de la fidela kolegaro en nia malgranda landeto.

Pasintjare *Bulgara esperantisto* denove firme ekstaris sur siaj piedoj. Ĝi duobligis sian abonantaron, atinginte 1300 pagintajn abonantojn.

Tiu malavara kaj amasa subteno de la bulgaraj samideanoj permesis al la Asocio ĝin eldoni ĉi-jare en duobla amplekso — 16-paĝa, ĉe la sama abono — 20 levoj, bonigante ĝian enhavon kaj teknikan aspekton.

Sed tio duobligis la elspezojn de la asocia gazeto!

Kaj por konservi la akiraĵojn de la pasinta jaro, por povi marŝi senĉese an-

*Български есперантисти! Да закрепимъ съюзния органъ! Да запишемъ до 31 XII 1938 год. 1800 АБОНАТИ НА „BULG. ESPERANTISTO“! Подробности по кампанията за „Bulgara esperantisto“ — на стр. 12.*

taŭen **Bulgara esperantisto bezonas nepre 1800 pagintajn abonantojn.**

*Ni kolektu ilin ĝis 31-XII 1938!*

Ni sekvu la ekzemplon de la bravaj *Varnaj samideanoj*, kiuj promesis ĝis tiu dato kolekti kaj sendi al la asocia kaso 80 abonojn; ni imitu la ekzemplon de modesta agronomo *Lakov el Kabijuk*, kiu jam abonigis en tiu ĉi mastrumo (ne eĉ vilaĝo!) 9 amikojn de nia lingvo; nin kuraĝigu la fervoro de la Sofia samideano O. V., kiu sciis tiamaniere distribui kaj plani sian tempon kaj eblecojn, ke sukcesis kolekti en daŭro de unu monato 118 abonojn!

Se ĉiu el ni pagos nur sian abonon kaj varbos almenaŭ unu novan abonanton — ni venkos! Ne per vanaj vortoj, sed per tuja konkreta konstrua laboro ni plej inde festos la 15-an de decembro — la naskiĝo-tagon de nia Majstro, la tagon de la esperanto-libro!

*Asen Grigorov*

703.453 - C. 607p.  
20  
1938/39

# AL ZAMENHOF

(OKAZE DE LA NASKIĜTAGO DE LA MAJSTRO — 15-XII.)

Herede prenis ni  
la verkon de l' revulo  
kaj utiligas ĝin  
por nia alta cel' —  
heroldoj de l' estont'  
luktantoj tre konsciaj,  
ni kavaliroj bravaj  
de l' hela Verda Ste'l!

Simile al karbo, elektro, radio  
ni jungis la lingvon tutmondan al ĉar',  
por helpi la venon de l' mondharmonio,  
de l' hela estonto por tuta homar'.  
Ĝin fajlas kaj frezas la nova epoko,  
facetas la bona, pac-ama destin',  
kaj, ĉiam pli taŭga, ĝi pulsas kun voko  
por nova feliĉo kaj paco en viv'!

Kvindekan jaron jam  
ĝi estas parolata!  
Kun tre fortika kred'  
ĝi floras sur la ter'!  
Trankvile ŝetis for  
ni la abstrakton revan  
kaj hardis por batal'  
la lingvon de l' esper'.

Kaj tamen, neniam aspektis pli viva  
la verko de l' granda, revula pacem',  
ol nun, en la jaroj de l' lukto aktiva  
sur ĝia honesta kaj brava posten';  
neniam antaŭe ĝi spiris simile,  
ol nun en la fajra diskuta parol',  
neniam pli certe ĝi skermis armile  
en manoj de l' kredo, konscio kaj vol'!

Ni tion, Zamenhof,  
akcentas por memori  
pri via datreven'  
en ĉi decembra tag';  
sen ajna tomba kult'  
akceptu nian dankon, —  
ĉar dankon sentas ni  
pri via granda ag'!

En nia penado vi restos kunule  
helpant' por konstrui la mondon de l' nov'  
kaj via persisto nin gvidos stimule  
en ĉiu decida labor', Zamenhof.  
Ĉar samajn, videble, ni havas celadojn,  
la bonon ni trovas en kre-solidar'  
kaj sentas nin varmaj ide-kamaradoj  
en kuna aspiro: libera homar'!

*Zefiro*



# NEĜO SUR VITOŜA

Ne nur somere — ankaŭ vintre Bulgarujo prezentas belegan objekton por turistoj.

Ni antaŭ ĉio rekomendas al niaj alilandaj samideanoj viziti la ĉefurbon—*Sofia*.

Tiu ĉi urbo estas la elirpunkto por la plej ŝatataj ski-sportejoj, precipe *Vitoŝa-montaro*, kies plej alta supro estas 2286 m. super la marnivelo.

La plej favora sezono por la vintro-sporto estas *decembro, januaro kaj februaro*.

La temperaturo dum tiu tempo en ĉiuj lokoj super 1000 m. da alteco estas sub la nulo.

La vintro en la bulgaraj altmontaroj tamen ne estas kruda, kaj en la suproj — relative libera de nuboj kaj nebuloj.



Al la supro!



Niaj alilandaj s-anoj povas fari ankaŭ plezurigan vintro-ekskurson al la tre proksima kaj alirebla *Ljulin-montaro* (plej alta punkto 1,230 m. super la marnivelo).

Miloj da sofianoj ĝin vizitas vintre.

Vitoŝa-montaro, senpere apud Ljulin, estas unike majesta. Neĝo kronas ĝian frunton preskaŭ dum la tuta jaro.

Ni tamen nepre avertas, ke Vitoŝa kun ĝiaj turistdomoj (inter kiuj kelkaj kuŝas super 1700 m.), estas rekomendinda nur por la skiistoj, kiuj ne serĉas en la altmontaro komfortajn kaj luksajn hotelojn, sed kontentiĝas pri simplaj rifuĝejoj.



En la virga neĝo



La vintro — skulptisto

Detalajn informojn *en esperanto* plezure kaj *senpage* donas la bulgara vojaĝoficejo „*Balkan*“, str. Alabin № 58 Sofia.

## SAMIDEANINOJ

— Malbeninda filino, ree iraĉos, ree... Ho, Dio mia, kiaj tempoj nin trafis! Knabino vagas kiel viro! Eĉ la viroj ne vagadas tiom! . . .

Tiel plendis kaj malbenadis la maljuna patrino, kiam Andreeva sin preparis por eliri. Vanaj estis ŝiaj klopodoj konvinki sian patrinon pri la bezono ĉeesti la kunvenon, kiun aranĝis ĉi-vespere la societo.

— Kunveno, societo! Mi ankaŭ estis juna, sed tiajn aferojn ne konis. Diablo prenu la societon kaj la kunvenon! Juna knabino vizitas societojn, kunvenojn, inter la viroj! Ho, Dio, Dio! Restas, ke vi nur metu pantalonon, malbenita filino!

Andreeva plu ne rezistis. Ŝi sciis, ke vanaj estus ŝiaj klopodoj, nekomprenitaj — ŝiaj paroloj. Ŝia animo forte suferis. Ŝi eliris kun larmoj en la okuloj. Sur la strato ŝin renkontis Mara, aktiva anino de la esperantista societo. Ili komencis paroli pri societaj aferoj, pri la amuzvespero, kiun oni projektis, pri la estonta agado. Andreeva forgesis la hejmajn malagrablajojn.

\*

La kunvenejo estas jam plena. Vigle vibras en la aero la esperantistaj vortoj. La gesamideanoj interparolas pogrupe. Jen, ĉi tie oni serioze parolas pri io, gestas, disputas; tie oni parolas gaje kaj ridas. Mara kaj Andreeva salutas kaj alproksimiĝas al la grupo de la gejunuloj. La ĉiam gaja Lena parolas kaj ĉiuj ŝin aŭskultas kun atento. Ŝi rakontas, kiel ŝi forglitiĝis de la okuloj de l'patrino. Ŝi bone ĉasis la momenton kiam la patrino parolis tra la lignobarilo kun la najbarino, kaj silente, surfingre eliris. Sin trovinte sur la strato, ŝi ekkuris rapide, por ke la patrino ne vidu ŝin. Apenaŭ post la stratangulo ŝi trankviliĝis kaj ekmarŝis modere al la klubejo. Lena parolas gaje pri siaj „herojoj“. La aŭskultantoj ridas. Andreeva ankaŭ ekridetas. Ŝi rememoras pri siaj gepatroj, tamen konsolas ŝin la fakto, ke ne nur ŝia sorto estas tia.

La prezidanto leviĝas. Li anoncas la

malfermon de la kunveno. Ekestas silento. Lian perfektan esperanto-paroladon avide absorbas la geanaro. Ilin atendas grava laboro. Ili devas bone aranĝi la propagandan semajnon. Ĉiuj devas partopreni ĝian preparon! Okazos du publikaj paroladoj, tria — antaŭ la mikrofono, artikoloj pri esperanto en la lokaj ĵurnaloj kaj fine—amuzvespero. Post tio oni malfermos kursojn por komencantoj.

Sekvas diskutoj, diversaj opinioj. Andreeva stariĝas. Ŝia belsona kaj entuziasma parolo disverŝiĝas en la ĉambro. Kiel sorĉa muziko ĝi tenere karesas la aŭdseinton de la junaj ĉeestantoj. Ĝi kaptas la korojn, inspiras entuziasmon . . . Ili devas labori, abnegacie labori. La vivo de l' Majstro, lia sindono por la homaro, estu ekzemplo por ili. Nur per solidara kaj fervora agado estas atingebla progreso . . . Emocio rapide levas kaj mallevas ŝian bruston. Fajron entenas la paroloj. Ŝi finas per apelo, ke ĉiuj laboru vigle por la sukcesplena aranĝo de la propaganda semajno.

Komenciĝas postuloj por laboro. Jen, knabino volas kudri la paper-kostumojn por la sceno, aliaj—prepari la ornamaĵojn por la salono, triaj anoncas sian pretecon prelegi. Tri junuloj volas disglui la afiŝojn. Fortajn aplaŭdojn renkontas ilia propono. Do, la societo elspozos neniom. Oni ne bezonas fremdajn homojn por helpo. Eĉ la plej malagrablan laboron plenumos samideanoj, al kiuj oni pagos nur idealon. Andreeva, kiel sekretariino, estas zorgonta pri permesoj de la aŭtoritatuloj, pri biletoj k. t. p. Ŝajnas, ke la laboro ne sufiĉus por ĉiuj. La maljunaj samideanoj rigardas mire tiun amasan entuziasmon, tiun flamon, tiun vulkanon, kiu murmuris kaj ribelas por pli bela estonto. Ho, se ĉie regus tia flamo, la tuta lando verdiĝus!

La kunveno estas fermita. Sed neniu eliras! La interkonsiloj kaj la aranĝoj daŭras. Kiam oni fine eliras el la kunvenejo, la urba horloĝo batas duonon post la naŭa. Timkrietoj deŝiriĝas de kelkaj buŝoj. Oni rapidas hejmen.

\*

Andreeva premas la seruron de la korta pordo kaj alpaŝas al la ŝtuparo. Ŝia koro batas forte. Kion diros nun la gepatroj pri ŝia malfrua enhejmiĝo? Kiel ŝin renkontos ŝia severa patro? La patrino ion serĉas en la salono.

— Tre frue, tre frue vi revenas! — mallaŭte murmuris ŝi, kvazaŭ time.

— Bonvesperon! — apenaŭ eliras saluto el ŝia buŝo al la patro. La lasta sidas pensabsorbite ĉe la tablo. Lia malhela rigardo trapenetras la murojn, eliras sur la straton kaj sin direktas ien malproksime. La filina saluto lin timvekas.

— Kial vi venas? Kial vi ne dormis sur la strato, hunda filino? — subite krias la patro. Viciĝas aro da malbenoj, riproĉoj, humiligaj komparoj, „bondeziroj“ . . . Andreeva ne aŭdas la vortojn. Sian aŭdon gratas nur ia monotona kriadon. Si silente toleras. Fine la patro laciĝas. La voĉo malplilaŭtiĝas. Lia severa riproĉo pasas en formon de trankvila edifo. Andreeva eniras sian ĉambron. Diversaj pensoj traflugas ŝian cerbon. Kion fari? Ĉu tiel daŭros eterne? Ĉu eterne ŝi suferos pro la nekompreneblo de ŝiaj gepatroj?

Ŝi rememoras la konsilojn de s-ino Dimĉeva. „Konvinku, konvinku viajn gepatrojn! Alkutimigu ilin al la situacio!“ Ĉu eble konvinki, alkutimigi? Malfacila afero! Tamen, en la komenco la gepatroj tute ne permesas al ŝi malfruiĝi. Iom post iom ili plimildiĝas, kvankam tre malrapide. Tamen per obstina kaj pacienca batalado eslas ĉio atingebla. Ŝi ekskribas la protokolon pri la ĉi vespera kunveno.

\*

Forpasas kelkaj tagoj. Kelkaj junulinoj gastas ĉe Andreeva. Ili preparas la necesajn por la amuzvespero. Ili gaje babilas esperante. La patrino feliĉe aŭskultas kaj rigardas tiujn knabinojn, kiujn inspiras althomaj idealoj.

— Tiel, tiel, infanoj, kunvenu hejme, laboru, kantu, gaju! Kial vi bezonas viziti kunvenojn, iradi tra la stratoj. Vidu, kiel bone estas! Ĉiu vin laŭdos.

— He, sinjorino, — sin aŭdigas Lena, — sen kunvenoj ne eblas. Ja ni tie decidis la diversajn aferojn.

— Lasu tion al la viroj! Ĝi ja estas vira afero!

— La viro kaj la virino estas egalaj, — respondas Lena. — Jam pasis tiu tempo, kiam la virino estis sklavino de la viro. Ni kune kun la viroj devas forĝi la helan estontecon de l'homaro.

Iu frapas sur la pordon. Eniras la prezidanto. Li salutas gaje kaj gratulas la laboremajn samideaninojn pri ilia sindonemo. Li sidiĝas, komenciĝas vigla interparolo. La prezidanto gaje rimarkigas al la knabinoj iliajn lingvajn erarojn.

Vesperigis. Mara leviĝas por eliri.

— Ho, kial vi tiel rapidas? — volas ŝin haltigi Andreeva.

— Mi ne povos plu resti, ĉar miaj gepatroj riproĉos min. Ili ne permesas al mi okupiĝi pri esperantaj aferoj. Ili diras, ke ĝi estas juda lingvaĉo. Se ili eksciis, ke mi vizitas niajn kunvenojn, ve al mi. Do mi ne restu plu! Ĝis revido, gesamideanoj.

— Ha, — komencas la patrino de Andreeva post la eliro de Mara, — kiaj stultaj homoj ekzistas en tiu mondo! Juda lingvaĉo! Kio pli bona ol tiu lingvo, ol la interkompreniĝo de ĉiuj popoloj sur la tutmondo, ol la ĉesigo de la militoj. . . Nur la kunvenoj, tiu freneza vagado ĉi-tien kaj reen ne indas por knabinoj. Ili lasu tion al la viroj.

— Sinjorino, — ridas la prezidanto, — ni vivas en nova, moderna epoko. La virino jam okupas gravan rolon en la socia vivo. Ŝi batalas por justeco, por homeco, por egalrajto kun la viro, por pli bela estonto. Ĉu ŝi, kiu donas la vivon de la homoj, ne indas tion? Diru, ĉu vi kontentas pri via vivo?

— Ha, ĉu kontentas, dum la tuta vivo mi sklavis.

— Jes, la virino devas firme paŝi per siaj piedoj. Nur ŝi mem povas akiri per persista batalo sian liberecon. En iuj landoj jam la virinoj havas grandajn rajtojn. Ili estiĝas aviadistinoj, deputatinoj kaj eĉ ministrinoj . . .

La patrino aŭskultas forlogite. La parolo de la prezidanto ŝajnas al ŝi stranga. Ĉio dirita de la prezidanto konfuzas ŝian kadukan jam cerbon. Ŝia fantazio forflugas en malproksimajn, nekonatajn landojn, kie

ĝi vidas aviadistinojn, ministrinojn. La virinoj similas al la viroj. Ili portas pantalonojn; jen, sur iliaj vizaĝoj kreskas barboj, lipharoj . . .

Ŝi sopiras enpenŝiĝe.

\*

Estas semajno de febra laboro. La propaganda semajno komenciĝas. Sabate okazos la amuzvespero. Andreeva disdonas en la laborejo afiŝetojn al siaj koleginoj. La laboristinoj legas, entuziasmiĝas. Ili jam delonge scias la signifon de la verda stelo, ornamanta la bruston de Andreeva. La Zamenhofaj ideoj trovas fekundan grundon en iliaj animoj. Jam estas varbitaj tri laboristinoj por la malfermata kurso, aliaj du ankaŭ enskribiĝos, se iliaj gepatroj permesos. Andreeva parolas, klarigas, admonas.

\*

La amuzvespero. La salono estas bele ornamita per la flagoj de esperanto kaj de ĉiuj nacioj. Amase venas la publiko. Ankaŭ la gepatroj de Andreeva. Ŝi montras ilian lokon. La esperantista himno

tondras solene. Ĉiuj stariĝas. La okuloj de la junaj geesperantistoj brilas pro granda feliĉo. Postsekvas paroladeto, literaturaj kaj muzikaj numeroj. Ĉion postsekvas entuziasmaj aplaŭdoj.

Komenciĝas la amuza parto de la vespero. Andreeva prezentas al siaj gepatroj la prezidanton. Li sidiĝas ĉe ili. Videbla ĝojo ludas sur la vizaĝo de Andreeva. Ŝi komencas danci gaje. De tempo al tempo ŝi rigardas al la tablo de la gepatroj. La prezidanto vigle interparolas kun la patro. Tre malfrue la familio de Andreeva hejmeniĝas. La patro demandas sian filinon pri tio, pri alio.

\*

Pasas kelkaj monatoj. La patro ankaŭ murmuris, tamen pli kviete. La patrino pledas por la filino. Iun vesperon Andreeva revenas malfrue pro solena fermo de la kurso por komencantoj. Ŝi aŭdas la trankvilan patran voĉon. „Tre malfrue daŭras iliaj kunvenoj“. Feliĉa rideto ludas sur ŝiaj lipoj.

Ŝi estas venkinta.

*Violin Oljanov*

## ЕСПЕРАНТО ВЪ НАШИТЪ ГИМНАЗИИ

Есперантското движение въ нашитѣ училища постоянно се засилва и разширява. Ученицитѣ изучаватъ езика и го прилагатъ въ кореспонденция съ чужди страни и като четатъ книги на него.

Есперантскиятъ културно-просвѣтенъ крѣжець при *Севлиевската смѣсена гимназия*, който миналата година разви широка дейность, и тази година стои на едно отъ първитѣ мѣста (вижъ отдѣла *Organiza vivo*) и напоследъкъ е от правилъ до много съидейници ученици, учители и др., окрѣжно, съ което иска да проучи движението въ училищата. Тукъ препечатваме по-важнитѣ въпроси отъ това окрѣжно, като молимъ съидейницитѣ да отговорятъ на адресъ:

*Есперантски културно-просвѣтенъ крѣжець при Смѣсената гимназия — Севлиево.*

Отъ навременнитѣ отговори на съидейницитѣ отъ разни мѣста зависи понататъшния успѣхъ на движението въ училищата. *Gesamideanoj, estu akurataj!*

### Въпросникъ:

а) Учебно заведение; б) Сжществува ли при вашето у-ще еспер. крѣжець (група, дружество)? Ако не, колко ученици желаятъ да изучаватъ езика, колко го употрѣбаватъ? в) Досегашна дейность: курсове, реферати и др. г) Какви курсове се водятъ сега; кой ги рѣководи; д) Учитель-рѣководитель на еспер. крѣжець (група, дружество) — име, презиме, специалность; е) Кореспонденция съ чужбина водите ли? Използвате ли я (вие и вашитѣ учители) за обучението по разнитѣ учебни предмети? По кои? Типични примѣри?

## ЦАРСКИ ПРИВѢТЪ ДО ЕСПЕРАНТИСТИТЪ

На поздравителната телеграма, изпратена отъ XXV конгресъ на българскитѣ есперантисти въ Севлиево тази година, Негово Величество Царьтъ благоволи да отговори съ следната телеграма:

АТ. АТАНАСОВЪ,  
Председатель конгреса  
на есперантиститъ,  
Севлиево.

Благодаря сърдечно Вамъ и на българскитѣ есперантисти за изказанитѣ Ми приветствия по случай конгреса Ви.  
ЦАРЬТЪ.

Поздравителната телеграма, отправена отъ Конгреса до Негово Величество, гласи.

СОФИЯ — ДВОРЕЦА,  
НЕГОВО ВЕЛИЧЕСТВО ЦАРЯ

Отъ името на българскитѣ есперантисти, събрани на своя двадесетъ и пети конгресъ, и отъ свое име поднасямъ на Ваше Величество и на августейшото Царско семейство най-почтителни поздрави. Българскитѣ есперантисти неуморно и съ възторгъ допринасятъ своя дѣлъ въ общата работа за повече просвѣта и култура на българския народъ и отъ сърдце желаятъ на своето Отечество да върви въ пѣтя на напредъка подъ мждротото ржководство на Ваше Величество.

Председатель на конгреса.  
АТ. АТАНАСОВЪ

## ДЕНЬ НА ЕСПЕРАНТСКАТА КНИГА

На 15 декемврий всѣка година есперантиститѣ отъ цѣль свѣтъ празнуватъ единъ голѣмъ международенъ празникъ. Това е деньтъ на Заменхофъ. За да не остане това празнуване само едно платоническо пожелание, съ този важенъ день е свързанъ и още единъ празникъ. Този празникъ е есперантския ДЕНЬ НА КНИГАТА.

Въ този день ВСЪКОЙ ЕСПЕРАНТИСТЪ ИМА ЗАДЪЛЖЕНИЕТО ДА КУПИ ПОНЕ ЕДНА КНИГА. Само това дори да е единствената му покупка на книги презъ годината, пресмѣтнато е, че ако правилно се изпълнява тази благородна традиция, есперантската литература ще цвѣти и ще расте непрестанно.

По този случай, Б. Е. Съюзъ съ окр. № 4 напомня на всички д-ва, както и на всички отдѣлни есперантисти, по случай деня на Заменхофъ да уредятъ приятелски срещи на всички есперантисти отъ своя градъ или село, въ които всѣкой единъ да купи поне една книга, та било то и най-евтина.

Каталози се изпращатъ незабавно отъ Съюзната канцелария, ул. Алабинъ 50, София.

## REĜA SALUTO AL LA ESPERANTISTOJ

Al la saluta telegramo, sendita de la XXV kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Sevlievo dum la jaro kuranta, Lia Reĝa Moŝto Boris III, reĝo de la bulgaroj, bonvolis respondi per la sekvanta telegramo:

АТ. АТАНАСОВ  
Prezidanto de la  
esperantista kongreso,  
Sevlievo.

Mi kore dankas al Vi kaj al la bulgaraj esperantistoj por la esprimitaj salutoj okaze de Via kongreso.

LA REĜO

La saluttelegramo, sendita de la kongreso al Lia Reĝa Moŝto, tekstas:

СОФИО — LA REĜA PALACO,  
LIA REĜA MOŜTO

Je la nomo de la bulgaraj esperantistoj, kolektitaj en sia dudekkvina kongreso, kaj je mia nomo mi prezentas al Via Reĝa Moŝto kaj al la Aŭgusta Reĝa familio plej respektajn salutojn. La bulgaraj esperantistoj senlace kaj entuziasme faras sian parton en la komuna laboro por pli da klereco kaj kulturo de la bulgara popolo kaj ili elkore deziras al sia Patrolando marŝi sur la vojo de la progreso sub la saĝa gvido de Via Reĝa Moŝto.

La prezidanto de la kongreso  
АТ. АТАНАСОВ

## EL LA HISTORIO DE NIA ENLANDA ESPERANTO-MOVADO

La unuaj pioniroj.—Historia reĝa reskripto pri esperanto. — Gaste ĉe Carmen Sylva. — La kulminacia punkto de nia movado: enkonduko de esperanto en la gimnazioj. — Rememoroj de veterano

Pasis duona jarcento depost la publikigo de l'unua libro pri esperanto de nia nobla kaj genia Majstro — Zamenhof, kaj depost kiam en Bulgarujo aperis la unuaj en la mondo adeptoj kaj propagandistoj: D-ro Bogdanov kaj Krstju Mirski.



Per oraj literoj brilos eterne ankaŭ la nomoj de aliaj du modestaj propagandistoj, kiuj neniam parolis pri si kaj oferis multon al la devo ordonanta: la unuaj meritoplenaj apostoloj, kiuj kreis kondiĉojn por la estonta konstruo de bulgaraj esperanto-societoj kaj ligo: — mi parolas pri du aliaj karaj, estimataj porbatalintoj — la unua, Hristo Popov, popola instruisto, kaj la dua — Georgo P. Oreŝkov — telegrafisto. — Ili eldonis proprarimede, post Bogdanov kaj Mirski, la tre necesan lernolibron kaj vortarojn kaj kreis la unuan ibulgaran priesperantan revuon „Rondzranto“, kaj la unuan esperanto-organizaĵon — la klubon „Stelo“ en Plovdiv. — Formiĝis ankaŭ en Sofio la esperanto-klubo „Aŭroro“. — Pli malfrue eklaboris novaj fortoj kune kun

malnovaj. Aperis junaj kaj maljunaj apostoloj: Georgo Aktarĝiev, Hristo Haralambiev, N. Kovaĉev, Pano Jordanov, Georgi Atanasov, T. Kânev, la apotekisto Zlatev (Tirnov), Dim. Malĉev, Simeon Petkov, Hristo Rjahovski, Atanas D. Atanasov, Stefan Minkov, Ksenofon Jankov, Vasil Gaŝevski, Doĉo Stanev, Leŭtenanto Dimitr Dobruĝanski, Vasil Filipov (Vasko Damin) el Ŝumen, Nikolaj Hristoskov, Panajot Hitrov, Ivan Krestanov, Petr Toŝkov, k. c. k. c. — tuta pleado.

En la historio de l'disvastiĝo de esperanto en Bulgarujo restos neforviŝebla fakto la klera kaj la favora rilato al esperanto de nia eksreĝo kaj de la bulgara milita estraro. Pri tiu rilato atestas jena reĝa reskripto: „Kun la bonvolo de Lia Reĝa Moŝto estas permesate al la leŭtenanto de 4-a pionira bataliono Il. Silvestriev, porti la proprigitan de l'sciantoj de la helpa lingvo internacia esperanto, specialan 5-pintan stelon esperantistan kaj malfermi kaj gvidi por civitanoj kaj militistoj kurson por lernado de la lingvo esperanto“.

Tiu permeso estis grava, signifoplena, historia.

Tuj sekvis la fondiĝo de l'unua grupo esperantista en Ŝumen, — „Vekiĝo“. Tia estis formita ankaŭ en Tirnovo — „Lumo“. Tiutempe aperis la tre ŝatinda kaj necesa, la pli moderna lernolibro de Prof. Thèophile Cart kaj Pagnier, en bulgara lingvo, „Esperanto en 10 lecionoj“ kaj „Unuaj lecionoj de esperanto“, kiujn tradukis Georgi Atanasov kaj T. Kânev. — Kaj laŭ tiu ĉi gvidlibro leŭt. Silvestriev en Ŝumen komencis instrui en la unua kurso.

Okazis reciprokaj vizitoj de rumanaĵ esperantistoj al Sumenanoj — venis la nobla prezidanto de Rum. Esp. Societo D-ro Robin gaste kun sia edzino kaj infanoj,



leŭtenanto Savopol, la sekretario de R. E. S. John Giuglea, la humorplena Marinescu kc. — La movado paŝis antaŭen.

Dum 1907 formiĝis la Bulgara Ligo Esperantista en Tirnovo. Ĉi tiun organizkunvenon ĉeestis kelkaj el la plej sindonaj tiamaj esperantistoj, inter kiuj la skribanto, leŭtenanto D. Dobruĝanski, Janko Jankov, Dimitro Kânĉev, Doĉo Stanev k. c.

La sekvantan jaron 1908 okazis la dua kongreso de bulg. esperantistoj en Ruse kaj de tie multnombra ekskurso de bulgaraj esperantistoj al la kongreso en Bukureŝto, partoprenita, krome, ankaŭ de serbaj samideanoj (Prof. Dragomiro Andonoviĉ, Budjevack. c.), de rusa meritoplana esperantisto Nikolaj Petroviĉ Evstifejev. En tiu kongreso, kiu okazis 3 jarojn post la Bulonja kongreso (1905), la entuziasmo estis granda, kaj ĝi, laŭ sia konsisto havis preskaŭ internacian karakteron. En la kongreso de la bulgaraj esperantistoj en Ŝumen, partoprenita de rumanaj esperantistoj, kaj en tiu en Bukureŝto, la neesperantista publiko povis aŭdi paroladojn kaj diskutojn en esperanto; sur la scenejo en Ŝumen oni ludis komedion, kun partopreno de S-ro Marinesku (Humoresku); oni aŭdis la komponitajn de la unua sekretario de la grupo esperantista „Vekiĝo“, Ksenofon Jankov muzikaĵojn „Vekiĝo-marŝo“ (teksto Il. Silvestriev); „Ho, mia kor!“ (de Zamenhof), „La Suferanto“ (romanco), „La Revo“, „La Preĝo“ (tekstoj de Podrjabinnikov (ruso) k. a.

Kaj sur la Bukureŝta scenejo — oni vidis ludita kun partopreno de rumanaj esperantistoj kaj de bulgarino (mia fianĉino Jordanka Djukmeĝieva) la dialogon „Unu horo de esperanto“ (de Th. Cart); oni aŭdis samtempe la dolĉsonantan kaj belan kanton de l' sama aŭtoro „Mi aŭdas vin“, plenumitan jam de profesia muzikisto Polihronaides. — Kiel profunde ni sentis la belsonajn parolojn de tiu brava esperanto-pioniro kaj verda standardisto, kiu fosis tiel difinitivajn sulkojn en la plej krizaj momentoj de la esperanto-movado — Prof. Th. Cart! Ĉu oni povus forgesi la akcepton ĉe la rumana reĝino, la

fama verkistino Carmen Sylva en la kortego de Sinaja! Ŝia tenado estis nobla, kaj kortuŝanta — la protektado de l' kreita de ŝi instituto „Vatra Luminosa“. Ĉu oni povas forgesi kun kia atento ŝi aŭskultis la rakonton pri la masakroj kaj pogromo en Batak (1876) de l' simpla laboristo, sed perfekta esperantisto Petro Toŝkov, el Batak?

„Lumo“, organo de Tirnova grupo, fariĝis ligorgano: antaŭe, kiel grupa, ĝi estis hektografiita, kaj fariĝinte asocia, ĝi jam presiĝis. — La movado ĉiam pli kaj pli kreskis, fortiĝis. Aperis la hektografiita literatura revuo „Unu paŝo“, en kiu laboris novaj, junaj, sindonemaj esperantistoj Simeon Petkov, Spasov, Hr. Rjahovski k. c.

La entuziasmigita de mia korespondado kun li, iamalernanto Ivan Kreŝtanov, pruvis baldaŭ, ke li efektive fariĝis bonega, perfekta esperantisto, eldonante gramatikon kaj vortarojn esperanto-bulgaran kaj bulg.-esperantan. — Pli malfrue aperis la lernolibro ankoraŭ pli sistema de Atanas D. Atanasov, la vortaro de Haralambi Baĉvarov, tradukoj el Vazov kaj P. Slavejkov de A. D. A., pliriĉigo de la esperanto-literaturo per versaj tradukoj el Botev de I. Dobrev kc., la esperanto-sintakso de D-ro Z. Zahariev, kaj nun la plej novaj lernolibroj kaj vortaroj de As. Grigorov. Kaj kiel rezulto de l' agado de tre fervoraj esperantistoj, post la militoj estis enkondukita, laŭ akceptita en la parlamento leĝo, esperanto kielfakultativa lernobjekto en la sesaj klasoj de l' gimnazioj, ĉe la ministro de l' popola klerigo S-ro Omarĉevski.

Per tiu akto, kiu trapasis la fazojn de revo, propono, leĝprojekto kaj leĝo, la bulgara parlamento povas fieri, malgraŭ ke kelkajn jarojn pli malfrue nia lingvo estis ellasita el la programo de la gimnazioj kaj tiu ĉi leĝo estis forgesita.

*Ilija Silvestriev*

#### SAMIDEANO,

Pagu tuj vian abonon! Ne atendu la finon de la jaro. — La redakcio penos doni al vi regule la gazeton. Plenumu vian devon — pagu akurate la malgrandan sumeton, kiun la movado postulas de vi.

## KONCIZAJ INFORMOJ DE LA ALTA NORDO (INTERVJOO)

Mi revenis post 15-monata vojaĝado tra la bela nordo. Depost la 3. aŭgusto 1937, ĝis la 3. novembro 1938 mi vizitis Polujon, Danzigon, Mazurion, la Baltikajn landojn (Litovion, Letonion, Estonion), la skandinavajn landojn (Finnlandon, Svedujon, Norvegujon, Danujon kaj precipe Islandon),



Nederlandon, Belgujon kaj Luksemburgon. Mi atingis ĝis insulo Grimzey sur la nordpola cirklo, kie la suno ne subiras. Per tio ĉi mi finis mian traviziton de la Eŭropa kontinento, kiun en lasta novembro mi ankaŭ ĉirkaŭveturis.

Mi trovas Finnlandon la plej honesta, Svedujon la plej solida, Norvegujon la plej bela, Danujon la plej verda, kaj Islandon la plej stranga kaj simpatia lando en Eŭropo, kie ĉiu havas hejman bibliotekon kaj nur la idiotoj ne scias legi. Kaj Luksemburgo estas la plej bone ordigita, vera terparadizeto.

Mi faris centon da senpagaj paroladoj pri Bulgarujo kaj tricento da lokaj gazetoj raportis pri la bulgara lando kaj popolo, ofte kun bildoj. Mi parolis plurajn lingvojn fremdajn: rusan, francan, germanan, italan, anglan k. a., sed plej utilis al mi la internacia esperanto, ĉar ĉie sur mia longa vojo mi renkontis esperantistojn, kiuj faciligis kaj utiligis mian vojaĝadon kaj restadon. Tiel mi povis vidi ne nur la belaĵojn de la vizititaj landoj, sed penetri ankaŭ en la intiman vivon de la homoj, kio pli gravas.

Mi estas ravita de la alta kulturo de la nordaj popoloj, de ilia pacemo, laboremo, legemo, trankvileco, honesteco, gastemo. Tie oni elspezas sian monon ne por armigado, sed por bibliotekoj, kiuj estas pli belaj ol aliloke.

Mi havas multon por rakonti pri la nordanoj kaj ilin montri kiel modelon al la Balkananoj, tiel pro iliaj supremenciitaj ecoj kiel ankaŭ pro iliaj malaltigitaj poŝtaj, doganaj kaj aliaj tarifoj inter ili.

En Reykjavik mi enŝipiĝis en la islandan „Selfoss“ la 15. Julio 1938. En Antverpenon mi surbordiĝis la 29. julio 1938. Dum mia deviga libertempo, atendante la bulgaran ŝipon, mi havis la plezuron viziti Normandion, Luksemburgon kaj tridekon da urboj kaj vilaĝoj en Belgujo. Mi ĝuis la gastamecon precipe de flandraj gesamideanoj.

En Antverpeno mi enŝipiĝis en la bulgaran „Balkan“ la 1. oktobro 1938. Ĝi estas eleganta ŝipo aĉetita de Francujo. Mi estis la sola pasaĝero, kaj la ŝipo portis ŝarĝon de 4200 tunoj da plej diversaj komercaĵoj. La veturado per tiu ĉi ŝipo estis belega, escepte sur la Atlantika oceano. Tie en la Biskaja golfo — la tombejo de la maristoj — ni devis tri tagnoktojn batali kontraŭ la tempesto, kontraŭ la marondegoj kaj kontraŭ la akva elemento. Kaj nur dank' al la eltenemo, laboremo kaj braveco de niaj maristoj, nia ŝipo havis nur malmultajn difektojn kaj perdojn de 35 tunoj da koakso. Mi certiĝis, ke la bulgaroj taŭgas ankaŭ kiel kapablaj maristoj. Kaj krom tio ili estas tiel sindonaj kaj ĝentilaj, tiuj karaj marlaboristoj! Laŭdon al ili.

Ni preterpasis Lisabonon, Gibraltaron, la Afrikajn bordojn (Marokon, Alĝerion, Tunizion), haltis po tri tagnoktoj en insulo Malta, Pireo-Ateno, Istanbulo (Konstantinoplo) kaj Samsumo sur la sudorienta bordo de Nigra Maro en Anatolio (Malgranda Azio). Ĉie mi trovis geesperantistojn kaj bulgarojn, estis akceptita de la bulgaraj konsuloj kaj ambasadoj.

(Sekvas sur paĝo 11)

## TRA LA GAZETARO



Tempo (Japanujo), sept.

Polemikante kun G. Degenkamp, nia japana s-ano Jasutaro Nojima ne trovas, ke oni unue devas perfekte lerni la nacian lingvon, kaj nur poste perfektigi kaj verki esperante. Li daŭrigas: „Ni povas progresi en esperanto, ĝuste same ankaŭ en nacia lingvo. Do, la lertiĝo en ambaŭ lingvoj reciproke instigas inter si“.

Laborista esperantisto (Nederlando), № 8.

„Ni fakte devas ĝoji, ke la hodiaŭa momento ne permesas tujan enkondukon de esperanto en la lernejon, ĉar ĝi ne trovas nin pretaj por tio, nek en Nederlando, nek alilande. Tro frua sukceso surprizus antaŭ ĉio la esperantistaron mem. El tiu rezultonta fiasko aŭ malsukceso vaniĝus post mallonga tempo multjara penado.“

La tempon kuŝantan antaŭ plena maturiĝo de la cirkonstancoj ni utiligu por prepari nin en ĉiuj rilatoj“.

Argentina esperantisto, № 144—145, mencias la uzadon de esperanto per la radio-stacio Varna.

doroj kaj intervjuita de la loka gazetaro. En Ateno mi faris publikan paroladon antaŭ elektita publiko sub la prezido de D-ro Anakreon Stamatidis pri pli intima kunlaboro inter la balkanaj popoloj sur kultura-ekonomia kampo, montrante kiel modelon la skandinavajn popolojn kaj akcentante, ke la plej bona fortikaĵo inter najbaroj estas ilia amikeco. Sufiĉe da sangoj, fumo kaj ruinoj! Vivu la paco, amo kaj frateco!

*Ivan H. Krestanov*

*La redakcio aperigos la sekvantan n-on la 17-XII. Ni petas niajn kunlaborantojn sendi manuskriptojn ĝis 10-XII.*

## BONHUMORO

### Epitafoj

1. Kuŝas li trankvile en la tero  
kaj kontenta estas pri l' mallumo,  
ĉar li estis malamik' de l' lumo  
kaj de la justeco, kaj de l' vero!
2. Li honesta estis kaj al Di' fidela,  
ĉiun feston antaŭ la ambono staris,  
tamen tio tute lin ne baris  
foje la preĝejan monon ŝteli...
3. Ŝi al ĉiu hom' divenis  
klare ĉion pri la sorto,  
nur ne sciis, kiam Morto  
ŝian propran vivon prenis!

*Rinma*

### En la zoologia gardeno

— Kial la leono havas tiel grandan kapon, paĉjo? — demandas la filo.

— He, stultulo! Por ke ĝi ne povu ŝovi ĝin tra la krado! . . .

### Geedzaj rilatoj

Foje dum la nokto en la ĉambron de sinjorino Batema enrampis ŝtelisto.

La sinjorino vekiĝis.

Kiam en la mallumo la ŝtelisto proksimiĝis al la lito, li ricevis tian frapon, ke tuj svenfalis.

S-ino Batema lumigis per la lampo kaj vidinte la kuŝantan homon, vokis policanojn.

— Vi mortbatis lin — konstate diris la policano — kiel vi frapis lin?

— Ja mi tute ne supozis, ke li estas ŝtelisto, respondis indifere s-ino Batema. — Mi kredis lin mia edzo kaj frapis lin kiel kutime . . .

*Karp*

● Въ никой есперантски клубъ, въ никой есперантски домъ, въ никоя кантора, канцелария или друго мѣсто, кждето има есперантисти, не трѣбва да липсва портретътъ на Д-ръ Заменхофъ, гениалния авторъ на междунар. езикъ. Художествено изработенъ, размеръ 30×45 см., за окачване на стена. Цена 10 лв. При поржчка на повече отъ 10 броя — по 6 лв. — Суми се изпращатъ въ чисти пощенски или гербови марки, или по пощенска чекова смѣтра № 1133 на Съюза. Адресъ: Бѣлг. есп. сѣюзъ, Алабинъ 50, Софя ●

## ORGANIZA VIVO

### La esperantista movado ĉe la mik-sita gimnazio en Sevlievo

La 2-an de novembro la esperantista rondeto ĉe la mik-sita gimnazio okazigis referaton. La lernantino Vena B. Min-kova parolis pri la deveno kaj signifo de esperanto.

La 15-an de la sama monato la lernanto Mitju Hr. Nikolov legis referaton je temo: „Meritoj kaj rezultoj de la esperantista movado en Sevlievo“. Ĉeestis ne malpli ol 80 gelernantoj, kiuj konvinkigis el la cititaj ekzemploj, ke la Sevlievaj esperantistoj — civitanoj kaj gimnazi-anoj — povis konigi nian landon kaj nian

urbon al multaj fremdlandanoj. Oni sub-strekis la fakton, ke lernantoj de la kvara klaso (nun en la kvina) povis korespondi kun alilandanoj post dumonata lernado de esperanto. Por multaj tio estis nekredebla.

Post la referato, kiun oni aŭskultis kun vigla kaj streĉa atento, s-ro Simeon Hesapĉiev — gvidanto de la rondeto — faris provlecionon de esperanto laŭ la rekta metodo kaj igis ĉiujn ĉeestantoj paroli en la plej facila el ĉiuj ekzistantaj lingvoj.

Tuj post la referato kaj la provleciono sin enskribis en la elementa kurso pli ol 50 gelernantoj. Tiun ĉi kurson gvidos la lernanto Marin Jordanov.

(Sekvas sur paĝo 13)

## МЕСЕЦЪ ДЕКЕМВРИЙ — АГИТАЦИОНЕНЪ МЕСЕЦЪ ЗА СЪЮЗНОТО СПИСАНИЕ

За да може „*Bulgara esperantisto*“ да издържи финансово при удвоения си обемъ, подобрена хартия и много клишета и при *сжция абонаментъ 20 лева* — необходимими сж

**1800 ПРЕДПЛАТИЛИ АБОНАТИ!**

Български есперантисти!

Да ги съберемъ до 31 - XII 1938 година!

Да проведемъ на дѣло решението на 25. конгресъ въ Севлиево! Отъ насъ движението чака не само думи и решения, а и *дѣла!* Да не допускаме връщане назадъ!

Активисти, организирани и неорганизираны съидейници! *Bulgara esperantisto* — вашиятъ свѣтълъ факелъ — трѣбва още по-ярко да свѣти!

Проведете по градове и села *кампания за*

**1800 АБОНАТИ ДО 31 XII 1938.**

За цельта: а) Незабавно внесете абонамента си отъ 20 лева, б) съберете отъ всички мѣстни миналогодишни абонати и други приятели на международния езикъ абонамента за 1938/39 година. в) дружествата да изработятъ конкретни планове, съобразно съ мѣстнитѣ условия (както е сторило Варненското дружество), които планове да бждатъ изпълнени до 31 XII. г) да се препоржча абонирането на есперантскитѣ ни кореспонденти въ чужбина (абонаментътъ за чужбина, заплатенъ отъ български съидейници, е 30 лева). Да си разпредѣлимъ работата по абонирането, като не оставимъ *ни то единъ есперантистъ непосетенъ и неотчетенъ.*

Всѣкой активистъ, за всѣки 5 записани и отчетени отъ него абонати отъ 1. XII до 31 - XII, ще получи *подарѣкъ хубава есперантска книжка.*

Ония дружества и активни есперантисти, които достигнатъ и надминатъ миналогодишнитѣ достижения — ще бждатъ вписани на почетната *зелена дѣска.*

(Въ допискитѣ до „*Bulgara esperantisto*“ по кампанията да се даватъ и данни за броя на абонатитѣ презъ миналата година).

„*Bulgara esperantisto*“

Baldaŭ estas malfermota kurso por progresintoj, kiun gvidos s-ro Hesapčiev. Estos akceptataj nur tiuj, kiuj sukcesis elteni ekzamenon pri elementa kono de la lingvo.

*La rondeto* entreprenis enketon pri la esperantista movado en la gimnazioj kaj aliaj lernejoj en la lando. Speciala cirkulero kun demandaro estas dissendita al multaj adresoj kaj ĉiutage la rondeto ricevas respondojn el diversaj lokoj. La rezultojn de tiu ĉi enketo ni publikigos en la sekvantaj numeroj de „B. esperantisto“.

La intereso al esperanto plifortiĝas ankaŭ en aliaj gimnazioj: Ŝumen, Trojan, Lukovit, Kazanlik, Pleven, Pazarĝik, Razgrad, Popovo.

### Inspira laboro

Estas konata al ni la brava kaj persista laboro de niaj Varnaj samideanoj. Se ĉe ni ekzistus honorstandardo, certe ĝin elmeritus Varnanoj.

Ilia kuraĝa kaj entuziasma laboro inspiris nian junan esperanto-poeton Zefiro (ankaŭ Varnano!) verki jenan versaĵeton:

### Albatranoj

En ĉi tempo de teruro, furioz',  
kiam la fantomo fajra tra la valoj  
kaj tra l' montoj ĉion turnas en kaos'  
tra obstino kaj tra baroj  
marŝas viglaj Albatranoj.

Kontraŭ la mallum', rabio kaj koler'  
a mon ili verŝas en la homan koron  
kaj kuraĝe kantas himnojn de l' esper',  
solidare en laboro  
kun Albatra firma volo.

Se alvenas la obskura nub-terur'  
kaj ektemas antaŭmorte la ĉielo,  
jen: ekardas de Albatro la lumtur';—  
jen: rezistas citadelo  
de la firma bril-espero.

Kaj „Albatro“ plifortiĝas en rapid',  
ne atentis pri la pluv' da embarasoj,  
ĉie sonas Albatrana gaja rid'  
sonas kantoj pri la paco,  
kaj pri la batal' senlaca.

ZEFIRO

*Varna.* La 26-XI la esp. societo „Albatro“ akceptis detalan planon de estonta agado.

Jen estas la pli gravaj punktoj:

1. Propaganda semajno 5-XI—12-XI (vesperamuzo, publikaj paroladoj, artikoloj en la loka gazetaro, flugfolioj).

2. Ĉiusemajnaj kunvenoj kun viva gazeto.

3. Kursoj por komencantoj.

4. Esp.-ekspozicio por la civitanoj.

5. Abonigi ĝis 31-XII 80 samideanojn al „Bulgara esperantisto“.

6. Varbi por la B. Esp. Asocio minimume 100 membrojn, el kiuj 40 pagu la kotizojn al la Centra kaso ĝis 31-XII 1938, kaj la ceteraj 60—ĝis 30-VI 1939.

Baldaŭ malfermota kurso. Inter la urbanaro la intereso pri esperanto kreskas.

Zefiro

**Vigla vivo en Pleven.** S-ano R. K. Tričkov faris 13-XI, je la nomo de la loka societo, publikan paroladon pri „Esperanto en servado al la bulgaroj“.

La parolado estis abunde ilustrita per trafaj kaj konvinkaj faktoj el la esperantomovado en Bulgarujo kaj tutmondo kaj el la propra sperto de la parolinto. Por ĉiu aŭskultinto iĝis klare, ke bulgaraj esperantistoj efektive agadon tre profitoplenan por la bulgara lando kaj popolo. La parolinto refutis la onidirojn, ke la esperantistoj pensas nur pri la mondo kaj ignoras sian patrujon. Bulgaraj esperantistoj, invitu s-anon Tričkov ke li ripetu sian paroladon ankaŭ en via urbo aŭ vilaĝo!

La kurso por komencantoj estas malfermita la 15-XI.

La malnova kurso renovigis sian funkciadon jam la pasintan monaton.

\*

Ni laŭdas kaj notas, pro fervora, sindona kaj modela agado,

### sur la Verdano honor-tabulon

1) la samideanojn en Mlečevo ap. Sevlievo, kiuj duobligis la nombron de la abonantoj ĉi-jare;

2) samideanon Atanas Lakov, agronomo en Kabijuk, kiu abonigis 9 samideanojn en tiu ĉi ŝtata mastrumo;

3) samideanon O. V., Sofio, kiu sukcesis abonigi 118 esperantistojn, preskaŭ ĉiujn en Sofio; por la celo li sciis mobilizi kaj utiligi la helpon de siaj esperantokonatuloj;

4) samideanon Boris Marinov, lernanto en B. Slatina, kiu abonigis 6 samideanojn kaj ĝustatempe sendis la monon al la Centra kaso.

## K R O N I K O

Nia eminenta samideano s-ro Nikola Jotov, longjara prezidinto de la esperanto-societo en Pazarĝik okupis la postenon de Ministro de la Justeco. „Bulgara Esperantisto“ kore gratulas.

\*  
*La redakcio sendos senpage belan libreton al ĉiu alilanda samideano, kiu tradukos kaj aperigos en nacilingvan gazeton aŭ ĵurnalon nian artikolon „NEĜO SUR VITOŜA“. Oni sendu el-tranĉaĵon al la redakcio.*

\*  
En la sekvanta n-o aperos la dua parto de la artikolo de Sim. Hesapĉiev pri „la maniero traduki en esperanton specife bulgarajn vortojn“.

La presigo de tipa statut-modelo por esp.-societo okazos post konfirmo de la Bulg. esp.-asocio, laŭ la nova ĉi-koncerna leĝo.

\*  
La redakcio kore dankas la kunlaborantojn, kiuj helpis ĝin per abundaj kaj

5) S-ano Boris Milĉev el Kneĵa, kiu sendis al la Centra Kaso 18 abonojn.

### Sur la Nigra tabulo!

Ni ricevis korespondaĵon de s-ano Karp, kiu informas ke la Esp.-societo en Plovdiv faris en la lastaj 4 monatoj abolute nenian agadon. Eĉ ordinaran kunvenon la Plovdiv'aj esperantistoj ne okazigis post la kongreso en Sevlievo.

Ni scias, ke la movado en Plovdiv dum la lasta jaro denove vekigis, ke la tiea societo duobligis la nombron de la membroj kaj ke oni povas ankoraŭ multon atendi de Plovdivanoj.

S-ano Karp, ni esperas, ke vi dum decembro sendos al ni informon, riĉan je faktoj pri organiza vigliĝo, ellaboro de plano, kolekto de 50 abonoj ktp.

*Plovdiv* ne plu devas resti sur la Nigra tabulo.

Plovdivanoj, faru, ke ni skribu la nomon de via societo sur la Verd an honor-tabulon!

(kun nemultaj esceptoj) taŭgaj materialoj.

Oni konsideru la malgrandan amplekson de nia gazeto kaj bonvolu ne sendi tro longajn manuskriptojn.

Oni skribu legeble, maldense kaj sur unu flankon de la folio, por ke la redakcio povu eventuale fari korektojn.

La aŭtoroj notu siajn adresojn sur la manuskriptojn mem.

\*  
Por denove kontaktigi kun la movado malnovajn samideanojn, kiuj pro tro multaj profesiaj kaj sciencaj okupiĝoj iom forĉirigis de la esperanto-medioj, la Centra komitato okazigis la 2-XI amikan vespermanĝon en la restoracio de „Slavjanska Beseda“. Ĉeestis, krom ĉiuj membroj de la Centra komitato, ankaŭ s-anoj d-ro St. Ĝuĝev, d-ro Zah. Zahariev, inĝ. Peevski, St. Minkov, d-ro Vl. Hristov, Iv. Vâlcanov (inspektoro ĉe la Ministerio de la publika instruado) k. m. a.

Ĉe la renkontiĝo regis gaja humoro.

● Искате ли да се запознаете основно с идеологията, историята, успѣхитѣ и разпространението на международния езикъ? Искате ли да имате материалъ за сказки, реферати и пр. върху есперанто? Набавете си следната


#### ПРОПАГАНДНА ЛИТЕРАТУРА

Възможенъ и нуженъ ли е единъ междунар. езикъ, отъ проф. Шишмановъ	5 лв.
Есперанто, проф. Шишмановъ	2 лв.
Есперанто ще завладѣе свѣта, отъ Д-ръ Д. Гаврийски	12 лв.
Международната конференция за общъ търговски езикъ	5 лв.
Животътъ на Заменхофъ, Едмондъ Прива	20 лв.
Практична граматика	3 лв.
Трета конгр. речъ на Заменхофъ	2 лв.
Четвърта и пета конгресни речи на Заменхофъ	2 лв.
Сумитѣ изпращайте въ чисти пощ. или гербови марки или по пощ. чекова смѣтка 1133 до: Бълг. есп. сѣюзъ, Алабинска 50, София.	

#### SE VI INTENCAS

реkomendi nian gazeton al via amiko kaj lin abonigi, ni petas vin fari tion senprokraste — vi kuraĝigos nin kaj plifaciligos nian laboron ●

LA REDAKCIO



## RADIO

### 1. Ĉiusemajnaj dissendoj:

Lunde: 19.30-19.35 Radio-Suisse Romande, 443 m. E. kurso de P. Bouvier.

20.45-21.00 Montpellier-Languedoc. 224 m. E. kroniko de A. Capjoulade.

23.20-23.35 Roma: 245 m-24m4. Informoj.

24.45-01.30 Paris P.T.T. 431 m. E. teatraĵo laŭ enondigo kaj reĝisoro de Marc Darnalut.

Merkrede: 16.00-16.20 Paris P. T. T. 431 m. E. kurso de C. Rousseau.

Vendrede: 23.25-23.40 Brno. 325 m. Praha. 470 m. Pri politikaj aktualaĵoj.

Sabate: 15.45-16.00 Lille. 247 m. E. kroniko de F-ino André kaj R. Curnelle.

20.00-20.29 Roma: 420 m-25 m. 4 Turisma propagando.

### 2. Aliaj dissendoj dum decembro

V. 2-XII: 23.25-24.25 BRNO. 325 m. Praha 470 m. E. horeto.

D. 4-XII: 11.15-11.30 Marseille. 400 m. E. kroniko de H. Bourdelon.

M. 7-XII: 22.13-22.20 Lyon P.T. T. 463 m. E. kroniko.

D. 11-XII: 17.00-17.25 Wallonia. 201 m. E. kroniko de A. Tassin.

D. 18-XII: 24.40-01.10 Hilversum KRO. 1875 m. 415 m. „Paĝoj el mia vivlibro“ de P. Heilker.

M. 21-XII: 22.13-22.50 Lyon P.T.T. 463 m. Informoj.

La dissendoj de Paris P.T.T.—ĉiulunde je 24 h. 45 min.

5-XII — „KANTEGRIP“ aŭ „LA POROKCIDENTA INDUSTRIO“, radiofona komedio, unuakta, de Christian Schewaedel. Traduko de André Remond. Presentado de S-ro Rémond.

12-XII — „LA BIRDOJ“, de Aristophane, adaptita el la greka, originalo de M.M. du Merton (unua parto). Presentado de S-ro Bastien.

19-XII — „LA BIRDOJ“ (dua parto). Presentado de S-ro J. Couteaux, kiu samtempe parolos al la francaj grupoj.

25-XII — „KRISTNASKA FABELO“, radiofona muntado de André Remond laŭ Dickens. Presentado de F-ino Y. Paulier.

### GRAVA RADIODISAŬDIGO

La 14 XII 1938 disaŭdigos Belga Radiostacio Bruselo, N. I R. Vlaamsch, ondolongo 321.90, je la 20 gis 20.30 horo, bonegan disaŭdigon, memore al morto de Zamenhof. La programo konsistas el deklamadoj kaj kantado.

Aŭskultu multnombre, kaj ne forgesu sendi instig- kaj dankleterojn al: N. I R. Vlaamsch, Eug. Flagey plaats, Brussel.

En la internacia konkurso, organizita de la Internacia esperanto-ligo (Londono), Bulgarujo ĝis nun okupas la *unuan* lokon.

Излезе отъ печатъ

ОРИГИНАЛЕНЪ ЕСПЕРАНТСКИ  
КАЛЕНДАРЪ (СТЕНЕНЪ)

ХУДОЖЕСТВЕНЪ СПОМЕНЪ ОТЪ  
КОНГРЕСА ВЪ СЕВЛИЕВО

Съдържа:

1. Карта на цѣлия свѣтъ съ образи, която бѣше изложена въ голѣмата конгресна изложба (вижъ умалена репродукция въ „В. Есп.“ брой 10 отъ мин. год.).

2. Постояненъ календаръ отъ 700 до 2099 г.

3. Подробенъ календаръ за 1939 год. Трицвѣтенъ художественъ печатъ, хубава хартия-форматъ 50 на 35 см.

Цена 4 лв., при повече отъ 10 екз. 25% отстъпъ, предпл. поржчки съ 30% отстъпъ.

Поржчки да се отправятъ до: Симеонъ Ст. Хесапчиевъ — Севлиево, пощ. чек-смѣтка 26-46.

● Jus aperis La Fantaskopo, rakonto de Svet. Minkov. El la bulgara tradukis N. Vasilev. Prezo 5 lev. Luksa eldono de Bulg. Esp. Asocio. Bela donaco por niaj alilandaj korespondantoj. Liveras la kancelario de la Asocio — str. Alabin 50, Sofia.

Наскоро излиза подъ печатъ, художественъ трицвѣтенъ календаръ

„ЕСПЕРАНТО“, ЦЕНА 5 ЛЕВА

Джобно календарче „ЕСПЕРАНТО“. Цена 2 л. Учебници отъ всички автори

За поржчки отъ 10 екз. нагоре и за дружествата 20% отстъпка. Суми се изпращатъ чрезъ пощенска чекова смѣтка № 3616, или чрезъ пощенски марки. Всичко се изпраща до „СПИКТУР“, международенъ институтъ, 50 ул. Алабинъ — София

● Едно отъ най-добрите помагала за изучаване и усъвършенствуване на международния езикъ е Есперантски синтаксисъ отъ Д-ръ Зах. Захариевъ. Цена 22 лева. Необходимо помагало за всички, които желаятъ основно да се запознаятъ съ граматиката и структурата на езика, за да могатъ правилно да говорятъ и пишатъ. Суми се изпращатъ въ чисти пощенски или гербови марки, или по пощ. чекова смѣтка № 1133 на Съюза. Адресъ: Бълг. есп. съюзъ, Алабинъ 50, София ●

## LA MONDO VIN VOKAS!



*Bulgaraj samideanoj,  
Korespondu kun la  
mondo, por apliki nian  
lingvon en la praktiko.  
Korespondante, propa-  
gandu la bulgaran lan-  
don kaj popolon.*

● H. Ph. Breuker, Schingen/Dronrijp (Friesland) Nederlando. 27-jara. Temoj: esperantismo, sociaj problemoj, filatelio.

● J. P. Colijn, 2 Kostverlorenkade 148 III, Amsterdam, Nederlando. 40-jara fervojista maŝinisto. Deziras kor. kun bulgara fervojisto.

● S-ro J. Robert Lostrie, 65 rue du Pont Levis, Woluwe St. Lambert apud Bruselo, Belgujo. Temoj: ter- aŭ ĝardenkulturoj nur kun lertuloj; interŝ. poŝtm.

● Marc Cornille, Avenue Rommelaere 119, Bruxelles II — Belgujo. Interŝ. poŝtm., korespondas ankaŭ franclingve.

● Roeland de Wilde, Vlierboomstraat 304, Hago W., Nederlando. 37-jara poŝtoficeisto. Temoj: bulgara lando kaj popolo, esperanto-movado; interŝ. poŝtm.

● Walter Johansson (adr. Käller), Box 340, Hällefors, Svedujo. 27-jara muldisto. Pri ĉiuj temoj.

● Pastro E. N. Thomas. 18 Tithe Barn Road, Strafford, Anglujo, deziras interŝ. il. poŝtkartojn kun Sofiano.

● S. Sytema, Appelsga, Frisland, Nederlando. 30-jara lernejestro. Temoj: edukado, instrumetodoj, lernejo-organizo.

● Marcel Auremboux, rue Labrosse Moulins-sur-Allier, Francujo. 28-jara instruisto. Temoj: turismo, per il. poŝtkartoj; edukado.

● J. C. van Doorn, Knollendamstr. 33 II, Amsterdam, Nederlando. — Telefonmuntisto en telefoncentralo. Pri ĉiuj temoj.

● A. I. Goemans, Molukkenstrato, Amsterdam (Oriento), Nederlando. 45-jara fervojisto. Temoj: laborkondiĉoj, labortempo, libertempo, permesbiletoj, salajroj ktp. ĉe la fervojo.

● Anthonie van Driel, Kazernestraat 24, Terneuzen, Holando. 24-jara transportlaboristo. Pri ĉiuj temoj; interŝ. poŝtm.

● N. Walters, Bornerbrocksche straat 89, Almelo, Holando. Pri diversaj temoj.

● A. Kolmann, XIII, Fürthweg 4, Wien, Germanujo. Kun komencantaj ges-anoj.

● Andries de Waard, Finschestraat № 26, Zaandam, Nederlando. Mezuristo de akvobaraĵoj. Temoj: popolkutimoj, moroj, esp.-movado; interŝ. poŝtm.

● Tiit Knoll, Pärnu mut, 89—2, Nõmme, Estonio. 22-jara junulo. Temoj: turismo, literaturo.

● W. Ter Braake, Borneostraat 20, Heemstede, Nederlando. 32-jara bakisto de tortoj. Pri diversaj temoj.

● N. Vergunst, Trompstraat 69, Haarlem, Nederlando. Vendisto en granda magazeno. Pri ĉiuj temoj.

● Ake Blomberg, Götgatan 24, Lidköping, Svedujo. 17-jara svedo. Pri ĉiuj temoj.

● F-ino Edith Kirby, 115 Crouch Hill, London, N. E., Anglujo. Dez. kores. kun bulgarino pri esperantismo, paco kaj similaj aferoj.

● Christian Tetenburg, Leringstraat 42, Amersfoort, Nederlando. 34-jara motoristo. Temoj: vivkondiĉoj, turismo, gimnastiko, promen-sporto; interŝ. poŝtm.

● H. A. Witte, Hasebroekstraat 13, Amsterdam, Nederl. 38-jara ĉarpentisto. Pri ĉ. temoj.

● Gregorio Amo, Auxiliar de Artilleria, Crucero „Mendez Nunez“, Cartagena, Hispanujo. 22-jara militmaristo serĉas por si kaj por siaj 4 lernantoj korespondadon kun fraŭlinoj.

● Erik Kapteik, Olmendaal 59, Rotterdam, Holando. 20-jara kontoristo. Pri ĉiuj temoj.

● Josef Mols, 1-e Kruizemuntstraat 12, Eindhoven, Nederl. Temoj: moroj, historio.

● L. Reed, Belkmerweg B 112, Burge-rolotbrug, Zype, Nord-holando, Nederlando-19-jara laboristo, pri ĉiuj temoj.

● H. Johkhart, Tulpstraat 8, Kooga/de Zaan, Hollando. 27-ara desegnisto. Temoj: polaj moroj, tekniko, soci-problemoj; interŝ. p. m.

● F-ino Brünne Fahler, Vöcklabruck, Gmundnerstrasse 43, Aŭstrio. Pri ĉiuj temoj.

● Aan Willem Venema, Ceresstraat 32, Stadskanaal, Nederlando. 18-jara vitrolaboristo. Pri diversaj temoj.

● J. Weber, Franeker, Holando. 50-jara direktoro de gasfabriko kaj urba elektro-entrepreno. Pri diversaj temoj; interŝ. poŝtm.

● J. van As, Dembrugstr. 46, Antwerpen, Nederl. Pri ĉiuj temoj, interŝ. poŝtm.

● Anton Kraker, Šimunićeva 15, Karlovac, Jugoslavio. Temo socia vivo.

● Josef Eder, b. G. Hegele, Hirschlanden ü. Ditzingen b. Stuttgart, Germ. Agrara kulturlaboristo. Dez. interŝ. bildkartojn.

### „BULGARA ESPERANTISTO“ —

*organo de la Bulg. Esperantista Asocio*  
Adreso: str. Alabin 50, Sofio, Bulgarujo.

Poŝtĉekkonto: 1133

JARABONO: *Enlande — 20 bulg. le-  
voj. Eksterlande — 2 sv. fr., 4 respond-  
kuponoj aŭ egalvaloro.*

Anoncoj: 1 kv. cm. — 1 levon

RESP. REDAKTORO: P. JORDANOV



# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Rekomendita de la Ministerio de publika instruado per cirkulero № 5677 de 3. II. 1938

## INTERPROKSIMIGŔO DE LA ESPERANTISTAROJ NAJBARLANDAJ

Unu punkto en la agadplano de la Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio por la kuranta asocia jaro estas, krei pli viglajn komunikojn inter la bulgaraj esperantistoj kaj iliaj samideanoj de la ceteraj, precipe de la najbaraj, landoj.



Jam antaŭ tridek jaroj la bulgaraj esperantistoj sentis kaj konsciis, ke tio estas la plej konvena vojo por efika propagando kaj por praktika aplikado de la internacia lingvo. En 1908 grupo da rumanaĵ samideanoj vizitis gaste la kongreson de la Bulgara Esperantista Ligo (tiam) en Ŝumen. En la sekvanta 1909 jaro pli ol cent bulgaraj samideanoj reciprokis, vizitante la unuan kongreson de la rumanaĵ esperantistoj en Bukureŝto; tien venis ankaŭ 11 serbaj samideanoj kaj para-

lele kun la Rumana esperanto-kongreso estis spontane okazigita ankaŭ unua kongreso de la esperantistoj el la apuddanubaj landoj. La feliĉe starigitaj interrilatoj daŭriĝis plue inter la bulgara kaj la rumana esperantistaro. La sekvo estis, ke en 1910 en Sofio oni kreis la komunan presorganon „Danubo“, kiu anstataŭis la du apartajn presorganojn de la Bulgara Esperantista Ligo („Lumo“) kaj de la Rumana Esperantista Societo („Rumana Esperantisto“); tiel estis fondita unu el la plej bone redaktataj kaj plej aŭtoritataj Esperanto-gazetoj de la antaŭmilita periodo.

Post la granda milito denove la bulgaraj esperantistoj unuaj iniciatis proksimiĝon kun la najbarlandaj esperantistaroj. En 1922 gaste alvenis al la bulgara esperanto-kongreso en Sofio grupo de jugoslaviaj samideanoj. En 1923 kaj en la sekvantaj jaroj jam la rumanaĵ samideanoj amase vizitis niajn kongresojn, kaj ankaŭ la bulgaraj samideanoj iris gaste al iliaj kongresoj (Kluĵ, Arad, Temeŝvar.

En 1930 dum la kongreso de la bulgaraj esperantistoj, jam kolektiĝis en Sofio samtempe reprezentantoj de la esperantistaj organizaĵoj en tri najbaraj landoj — Rumanujo, Jugoslavio kaj Grekujo (la lasta lando — unuan fojon!) kaj okazigis la Balkanan esperanto-konferencon. Kiel sekvo de tiu ĉi konferenco komencis aperi la bela gazeto „Balkana Konkordo“, kiu celis speguli la kulturan vivon de la balkanaj landoj; bedaŭrinde ĝia vivo ne daŭris pli ol unu jaron.

Ĉiuj samideanoj, kiuj havis la okazon parfopreni en tiuj renkontiĝoj de najbar-

(Sekvas sur paĝo 4)

NIKOLA LANKOV

## VINTRO

Neniam haltos ni, neniam ni revenos  
 dum furiozas vintra neĝteror'.  
 L'animojn frostajn ni per flam' varmigi penos,  
 per suno — la vastaĵojn en la for'!

O, falu blanka neĝ' kaj blovu turnovento,  
 la teron kovru frosto kaj glaci'!  
 Kaj sub la neĝ' glacia verdprintempo  
 kun junaj fortoj ĝermas pli kaj pli!

Kaj ni ne haltos plu ĉe l'vastaj neĝobaroj,  
 ĉar kio estis, — ne plu estas nun!  
 O, ne, ni per flamantaj firmaj manoj faros  
 fenestron larĝan tra l' ĉielmallum'!

Kun tiu vigla kredo forpasadas jaroj  
 kaj ĉiutage proksimiĝas vi,  
 printempo dezirata, en la neĝaj valoj,  
 nun kie krake krevas la glaci'.

O, falu blanka neĝ' kaj blovu turnovento,  
 la teron kovru frosto kaj glaci'!  
 Kaj sub la neĝ' glacia verdprintempo  
 kun junaj fortoj ĝermas pli kaj pli!

Tradukis *At. Lakov*

Skiado en Rila

## RILA—la plej alta montaro en la Balkano

La fiero de la Balkanaj montaroj estas la sovaĝa Rila-montaro, kun ĝiaj altegaj suproj, inter kiuj Musala (2925 m.) estas la plej alta sur la Balkana duoninsulo. Rila estas fama ankaŭ per siaj 160 lagoj, ĝiaj kristalakvaj „lazuraj ĉielokuloj“.

La verdaj paŝtejoj, ĉirkaŭitaj de altaj pinarboj sur montoj kaj en ŝirmitaj valoj, dum la vintro fariĝas blankaj lanugaj kampoj, oportunaj por saniga skisporto.

Tie ĉi, meze de la regno de l' pinarboj kaj en la tomba silento de la montaro, oni aŭdas, per la susurado de l' arbaro, la fabelon de la naturo tra la jarmiloj.

La urbo Samokov, du aŭtomobilhorojn for de Sofio, estas belega per sia pitoreska situo. Ĝi estas fama klimata kurorto, elirpunkto al ĉiuj direktoj de la Rila-montaro kaj estas vizitata de turistoj somere kaj vintrre. Ĝi estas nomata „La morta urbo“ pro la silento en kiu ĝi dro-



Samokov, vintro-restadejo

nas dum la vintra sezono, pro la multa neĝo.

Senpere apud la urbo troviĝas pinarbaro „Rido“ („La Monteto“), kies skijejoj estas bonegaj por la amatoroj de la vintro-sporto, ja eĉ por 6—7-jaraj infanoj.

Ne estas priskribebla la panoramo kiu estas malkovrata de tie ĉi.

Niaj samideanoj nur devus ĝin viziti kaj vidi!



En la koro de sovaĝa Rila-montaro. Rupite, unikaj suproj, taŭgaj por alpinisma grimpado

## La kultura rolo de la bulgaroj en la pasinteco

Antaŭ mil jaroj en Bulgarujo ĝermis kaj floris la unua slava kulturo. —  
La bogomilismo — movado por pli da socia justeco

La hodiaŭa malgranda Bulgarujo, kiu spertis politikan kaj spiritan jugon dum kvin jarcentoj, kiu estis senĉese detruata de militaj invadoj aŭ de longedaŭraj militoj, portas fiere la nimbon de tiu epoko, dum kiu ĝi fariĝis kultura hejmo de ĉiuj slavoj. La bulgara lingvo penetris ĉe ĉiuj slavoj kaj fariĝis sankta lingvo, ludante en Orienta Eŭropo tian rolon, kian la latina lingvo ludis en la Okcidenta.

Estante kultura hejmo de la sudaj slavoj, Bulgarujo estis la sola kaj grava fonto de civilizo por rusoj kaj serboj, por rumanoj kaj grandparte por albanoj de la 10. ĝis 14. jarcentoj.

La rusa princo Vladimir sin turnis al la bulgara caro Samuil, petante scienculojn kaj eklezian literaturon. En la 13. jarcento la metropolito de Kiev kaj de tuta Rusujo turniĝis al la tiama bulgara ĉefurbo Tirnovo, petante la kanonojn de la eklezio en bulgara lingvo.

Pri la spiritaj rilatoj inter bulgaroj kaj rusoj la rusa sciencisto Lemanskij skribas la jenon:

### Interproksimiĝo de la esperantistaroj najbarlandaj

(daŭrigo de la unua paĝo)

landaj esperantistoj, certe memoras la belajn momentojn, pasigitajn kune, plenajn de kora ĝojo kaj entuziasma kredo kaj espero. Tio estas momentoj neforgeseblaj!

Tiujn rilatojn ni deziras nun restarigi. Ni devas substreki, ke per ili la lernado de esperanto akiras sian specialan sencon kaj la esperanto-movado ricevos karnon kaj sangon.

Rilatoj internaciaj, en kiuj ĉiu nacio partoprenas samrajte kaj samdigne, en kiuj neniuj nacio sentas sin malpli taksata kaj malpli respektata — jen tio donas apartan signifon al la esperanto - movado.

Ni laboru por efektiviĝi tiun iniciativon de la Centra komitato ankoraŭ dum 1939 jaro!

Ada

„Dum tiu epoko la rusoj senĉese ricevis de Bulgarujo ne nur slavajn manuskriptojn, sed ankaŭ predikantojn, verkistojn, ikonografojn kaj preĝejajn kantistojn, ĉar Bulgarujo restis sur alta nivelo de kultura evoluo, kiu estas senkompare pli supera ol tiu de Rusujo de la sama epoko.“



Sed la influo de Bulgarujo etendiĝis ĝis la Okcidenton, kiam en la 10. jarcento aperis en ĝi la Bogomilismo — movado kiu, per sia religia kaj socia instruo funde skuis la bazojn de multaj ŝtatoj. En la malluma mezepoko de senvera obskurismo en tuta Eŭropo la homa personeco estis senkompare premata, la spirita vivo estis malebla: la eklezio surfokis ĉiun penson. Tamen en Bulgarujo estis tradukitaj la biblio, la evangelio, la meslibroj kaj ekfloris literaturo en nacia lingvo. En la preĝejo oni plenumis la meson en bulgara lingvo, komprenata de la popolo — kio en la katolika mondo signifus revolucion en tiu epoko.

La dekadenco de la moralo ĉe la eklezio estis ĝenerala en la tuta kristana mondo. Ĝi estis la kriza momento, kiam oni devis kompari kaj pritaksi la principojn

pojn de la Krista instruo kun la oficiala religio. La kristanismo serĉis vojon por konformiĝi al la vivo; sed el religio de senpovaj malriĉuloj, de prematoj—ĝi fariĝis religio de potenculoj, de premantoj. En ĝia tuta instruo oni elektis nur kelkajn sensignifajn dogmojn, oni forgesis la veran evangelion, donante pli gravan signifon al la diversaj decidoj de ekleziaj kongresoj, decidoj de „sanktaj patroj“. Sur tiu vojo de korumpiĝo ekiris ankaŭ la pastraro. Ĝi celis bonan, kontentigan vivadon, superfluaĵojn, kaj komentis la vivon tiusence.

La apero de malkontentuloj estis neevitebla. La herezoj do estis la natura reakcio de la deflankiĝo de l' kristanismo.

Homoj, kiuj serĉis en la religio ekkoni la veron kaj la sencon de la vivo, ne povis kontentiĝi per la eksteraj ceremonioj de la di-servo, nek per la seka dogmaro de la pastra prediko. Religio kaj eklezio perdis sian prestiĝon.

Ĝiuj herezoj, disvastigitaj en Bulgarujo baldaŭ nutris novan herezan movadon, sur specife bulgara grundo, kiu skuis tutan Eŭropon. En ĝi aperas precipe la socia elemento, kio korespondas al la demokratia karaktero de la bulgara popolo. Ĝi estis la bogomilismo. Unue la bogomilanoj levis la torĉon de la nova instruo por forigo de la socia maljusteco. Subigitaj al senkompata persekuto, ĝiaj adeptoj dismigris tra tuta Eŭropo, varbante novajn adeptojn inter la popoloj. Ekster Bulgarujo la pioniroj de tiu movado portis diversajn nomojn: en Francujo—albianoj kaj kataroj, en Italujo—valancanoj kaj pataranoj. La husistoj en Bohemio estas nenio alia ol sekcio de la sama movado.

Bulgarujo fariĝis spirita gvidanto de tuta Eŭropo. La sociaj ideoj, florantaj en Bulgarujo depost la deka jarcento, kaŝis la ĝermojn de la spirita renaskiĝo de Eŭropo. Ĉiuj humanaj ideoj de la 18. jarcento havis sian embrion en la bogomilismo. Per sia verko „La spirito de la reĝoj“, Montesquieux donis detalan klarigon de ĉiuj ĝistiamaj ideoj, metante la bazojn de la nova scienco—la sociologio kiu kaŝis sin en la bogomilismo.

La rolo, ludita de la bogomilanoj en

la intelekta renaskiĝo de Eŭropo antaŭ la apero de Jan Hus estis tre grava, laŭ la verkoj de la rusa slavisto Veselovskij.

Por reveni denove al la influo de la bulgaroj inter la slavoj, ni substreku, ke la serba literaturo faris siajn unuajn paŝojn ekskluzive sub la influo de la bulgara literaturo, influo, kiu daŭris eĉ multe pli malfrue. La serba historiisto D-ro Petronoviĉ skribas: „Ĉiuj serbaj landoj, inkluzive Bosnio, ne povis ne partopreni tiun ĉi spiritan movadon, venantan de Bulgarujo“. Tiamaniere ĉe ili establiĝis la slava liturgio, sub la gvido kaj influo de la disĉiploj de Metodi unue, kaj pli malfrue sub tiu de la bulgara episkopo Kliment de Oĥrid.

La bulgaraj lingvo kaj literaturo transpasis la ŝtatlimojn. La lingvo penetris Rumanujon en la tiama Valaĥio, ne nur kiel eklezia lingvo, sed ankaŭ kiel skriba. Ju pli oni sin returnas al la Rumana pasinteco, despli oni konvinkiĝas, ke la bulgara lingvo estis ĝenerale uzata. Oni trovas ĝin ankaŭ en Moldavio kaj Transilvanio. La bulgara lingvo estis por rumanoj la sankta lingvo, kia estis la latina por la francoj kaj la germanoj.

La bulgara popolo en tiu epoko kreis ion, kio vaste transsaltis la limojn de la Balkana duoninsulo—la bulgaran civilizacion, kiu, per sia lingvo kaj literaturo, radiis tra la tuta slava mondo.

Dissemite en tuta Eŭropo kaj anoncanta grandajn reformojn, la bulgaraj bogomilanoj vidis, ke la granda franca revolucio senmortigis la bazon de ilia moralaj kaj religia ideologio per la trivorto: „Libero! Egaleco! Frateco!“

Ni bulgaroj povas fiere ripeti kun la bulgara nacia poeto Ivan Vazov la versojn:

„Al la mond' ni ankaŭ ion kontribuis kaj popolojn slavajn legi ni instruis.“

*K. Draĵev*

#### SAMIDEANO,

Pagu tuj vian abonon! Ne atendu la finon de la jaro. — La redakcio penos doni al vi regule la gazeton. Plenumu vian devon — pagu akurate la malgrandan sumeton, kiun la movado postulas de vi.